

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La 104a Japana Esperanto-Kongreso 2017 en Jokohamo

dato: la 3a(ven.)-5a(dim.) de novembro 2017

loko: Halo Kanagawa Roodoo Plaza

(Gubernia instanco por Laboroficejaj aferoj)

en Jokohamo, Gubernio Kanagavo

Kongresa temo: Haveno peras, Esperanto peras

●Organizantoj

Kunorganizata de Japana Esperanto-Instituto kaj Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama.

Kunlaboras: Esperanto-Ligo de Kanagaŭa.

Aŭspicioj: petotaj de pluraj instancoj

●La kongresejo

Ĝi enhavas 400-personan halon, plurajn ĉambrojn por diversaj kunsidoj kaj ekspoziciejon. Ĝi situas en la urbocentro de Jokohamo, 3 minutojn piede de la fervoja stacio Ishikawacho. Tiun stacion atingi oni bezonas 100 minutojn de la Flughaveno Narita (Nova Tokio Internacia), aŭ 30 minutojn de la Flughaveno Haneda (Tokio Internacia), ĉiu per unu trajnŝanĝo.



●Kotizoj

Loĝantoj en Japanio (inkl. eksterlandanojn):

5 000 enoj (ĝis la 31a de marto 2017) /

6 000 enoj (ĝis la 31a de julio 2017) /

7 000 enoj (de la unua de aŭgusto 2017)

El aliaj landoj: 2 000 enoj

Pri ceteraj kotizoj (handikapuloj, junuloj, lernantoj, moralaj partoprenoj ktp) demandu Japanan Esperanto-Instituton

Bankedo: 7 000 enoj

Foto: 1 000 enoj

Lunĉoj: en la 4a kaj 5a de novembro, 1 000 enoj potage

Turismo postkongresa: nun planata

●Hoteloj

Mendu persone. Estas pluraj hoteloj proksime. KKK helpas alilandanojn trovi hotelon.

●Ĉefaj programeroj (nun planataj)

La 3a de novembro (vendredo, ferio en Japanio)

13:00 ~ malferma ceremonio kaj inaŭguraj eventoj

18:00 ~ Arta Vespero

La 4a de novembro (sabato)

09:15 ~ fakaj kunsidoj,

prelegoj (Esperante, japane)

13:00 ~ fakaj kunsidoj,

prelegoj (Esperante, japane)

18:30 ~ bankedo

La 5a de novembro (dimanĉo)

09:15 ~ fakaj kunsidoj,

prelegoj (Esperante, japane)

14:00 ~ fermo

15:00~ postkongresa ekskurso

La tuta kongresa tempodaŭro

Giĉeto kaj librovendejo

Ekspozicio: “Nia unua lernolibro de la lingvo”: lernolibroj de elementa lernejo en diverslandaj lernejoj, kolektitaj pere de Esperanto

●**Memoraĵoj** (laŭ plano)

1. Gvidlibro pri Jokohamo kaj ĝia ĉirkaŭo (provizora titolo): Ne nur pri turismaj lokoj kaj aferoj, sed ankaŭ pri historiaj aferoj kaj priskribo pri la vivo.
2. Kanagavo kaj Esperanto – Historio de Esperanto-movado en la gubernio Kanagavo: en la japana lingvo; redaktata kaj kompilata

nun de Doi Ĉieko

●**Por pli da informoj**

Havu kontakton kun Konstanta Kongresa Komitato (KKK) ĉe

Japana Esperanto-instituto

JP-162-0042 Tôkyô-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3

retadreso: jek2017@jei.or.jp

●**Loka Kongresa Komitato (LKK)**

Asignitaj de Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama:

Sibayama Zyun’iti (la estro), Doi Ĉieko, Fuse Kentarou, Miyazaki Hideko, Namba Fumiharu

Asignita de Japana Esperanto-Instituto

Kimoto Yasuhiro (la estro de la Kongresa Fako)

Tiel Okazis

Hama-Ronda Vespero novembra

nov. 19 (sab), 17h00-19h00, ĉambro 604 de Kanagawa-Kenmin-Sentaa

Ni diskutis, kia estos, kia estu la 104-a Japana Esperanto-Kongreso, okazonta unu jaron poste en Jokohamo, kun memoroj de la pasintaj Kongresoj, plurfoje okazigitaj en Jokohamo.

Ĉeestis ankaŭ s-ro Kimoto Yasuhiro, estrarano de Japana Esperanto-Instituto taksita prizorgi la Japanan Kongreson. Post la diskuto, 11-ope (kun s-ro Kimoto) ni havis bankedon.

La 1-a Kunsido de la Loka Kongresa Komitato

nov. 20(dim), 10h00-13h00, en Kanagawa Roodoo Plaza, la estonta kongresejo

Pri la 104-a Japana Esperanto-Kongreso, ĝis tiam nur ni, la Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama (NEJ) faris diskuton okaze de ties estraraj kunsidoj. En tiu tago, unuafoje NEJ kaj la kunorganizanto de la kongreso, nome Japana Esperanto-Instituto (JEI) kunsidis. Flanke de JEI venis s-ro Kimoto Yasuhiro, estrarano de JEI, kiu eniris en la Lokan Kongresan Komitaton (LKK), kaj s-ro Fukuda Masanori, la ĝenerala direktoro de JEI. De NEJ ĉeestis ĉiuj 5 estraranoj kaj s-ro Doi Hirokaz, la sekretario. En ĝi oni ĉefe traktis labordividon de NEJ kaj JEI.

Niaj Planoj

46-a Zamenhof-Festo de Kanagaŭa

dec. 18 (dim), 13h00-16h00, en la konstruaĵo UMECO en urbo Odawara

Gastprelegos s-ro Huzimaki Ken’iti.

La 2-a Kunsido de la Loka Kongresa Komitato

jan. 29 (dim), 10h00-14h00, en Kanagawa Roodoo Plaza

LKK-anoj kunsidos, inkluzive de s-ro Kimoto.

La Ĝenerala Kunsido

jan. 29 (dim), 14h00-18h00, en Kanagawa Roodoo Plaza

Ni, la Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohamo havos la 3-an ĝeneralan kunsidon, en kiu ni revuos la agadojn kaj finanĉan staton de 2016, kaj fiksos la planon, buĝeton kaj la estraron por 2017. La 104-a Japana Kongreso estos kompreneble unu el la temoj.



Eseo


Nomoj kvazaŭ-esperantaj

Sibayama Zyun'iti

En la mondo kaj en Japanio ekzistas nomoj de varoj, restoracioj ktp., kies deveno estas Esperanta; ekzemple Ne-Profitocela Organizo Animi (NPO 法人 アニミ) en Jokohamo tion klarigas en sia retejo. La organizo celas forigi baron kontraŭ handikapitoj, ktp. Alia Ne-Profitocela Organizo en Jokohamo estas nomata Futuro (フ ト ウ ー ロ), por subteni infanojn subevoluintajn, sed mi ne scias, ĉu ĝi devenas de Esperanta vorto, ĉar la sama vorto troviĝas ŝajne en itala, hispana, ktp, kaj nenie en la reto estas klarigo. En tiu ĉi okazo, kia ajn estas la devena lingvo, la senco de "Futuro" samas al la Esperanta vorto, t.e. estonteco.

Ekzistas vortoj signifohavaj en Esperanto, sed ties deveno ne estas konata, almenaŭ al mi. Unu el ili estas aŭto importata en Japanion de la hinda fabriko de Suzuki, nomata Baleno. Ĝi ne estas aŭto grandega, sed kun cilindrokapacito je 1200 kubaj centimetroj. Tial ne estas probable, ke la nomo devenas de la marbesto, esperante nomata baleno.

Nu, kiam el la Elektrokompagnio Panasonic aperis t.n. robota polvosuĉilo nomata "rulo" (kies formo similas al kvazaŭtriangulo en la bildo), mi unue supozis ke ĝi devenas de Esperanto, ĉar la suĉilo memvole "rulas" sin sur planko por purigi ĉambrojn. Sed tiel ne estis. La nomo devenas de franca matematikisto Franz Reuleaux [ru' lo'], kies eltrovaĵo estas nomata "la triangulo de Reulaux" (Vidu la bildon), kaj tiu formo estas utiligita ĉe la polvosuĉilo. Tiu triangulo fakte havas formon de iel dikigita orta triangulo el kurboj. Kiam ĝi ja rulas sin, ĝia larĝo ne ŝanĝiĝas. Tial estas taŭge, ke tiuforma roboto moviĝu tenante konstantan larĝecon, por kapti rubon laŭ ties irvojo.



Troviĝas alispecaj nomoj. Iuj nomoj havas nacilingve bonan sencon, sed se latinigite kaj komprenite kiel Esperanta vorto, ties senco humuriĝas aŭ malboniĝas. Ekzemplo estas Kato, ofta nomo japana kaj ankaŭ nomo de firmao fabrikanta arganojn (aŭ mekanikajn grupojn) k.a. Alia estas Koito, familia nomo kaj komerca nomo por aŭtaj maŝinpecoj.



Iuj nomoj estas tradukaj variantoj. Iam en Japanio estis 緑星企業 (ryokusei kigyō), kaj en Usono estis Green Star Trading Company, ambaŭ el "Verda Stelo", t.e. simbolo de Esperanto.

Alia okazo interesa al mi estas japana ĉenrestoracio ガスト (t.e. Gasuto). Legante la japanlingvan ŝildon mi unue supozis pri Gasto, do bona nomo por restoracio. Sed ne estis tiel. Latinigita ŝildo montris vorton Gusto. Fakte hispana vorto "gusto" estas esperanta "gusto".



(fotoj el Vikipedio)

Beletro

Septembra mesaĝo

AIDA Yayoi

Septembra vento akumulis falintajn foliojn sur la grundo kaj preparis molan kovrilon por la grilo jam senkorpa, nur kun animo ĉiam rigardanta ĉirkaŭaĵon kun intereso. Hodiaŭ posttagmeze ĝi rigardis alpan rozon ekflorantan ekstersezone, kaj la eleganta ruĝkoloro plene ĝojigis ĝin. Kiam nokto venis ĝi rigardis rondan lunon fanfarone ŝvebant surĉiele inter altaj fagoj. Por la grilo ne estis solece pasigi sola en la grundo sen amikoj, ĉar varmigis ĝian koron bona rememoro al ĝia pasinta vivo kaj riĉigis ĝiajn cirkonstancojn.



Kiam la grilo vivis, ĝi vizitadis la verandon de iu viro loĝanta kun malsana edzino, kaj tiam ĝi estis ofte forpelita de la viro. La edzino bedaŭris tiun konduton de la edzo. Ŝi amas helverdan korpon de la grilo, precipe la ĉarman figuron algluitan al transpara fenestro. La aktiva kapo, malicetaj okuloj, longa gracia korpo, ĉiuj estis

amataj por ŝi. Ŝi ofte alvokis ĝin, “Mia kara”. Tio ĝojigis la grilon kun iom da honto. Subtere kovrite de verkintaj folioj animo de la grilo rememoris la edzinon, kiu subite mortis en la somero ĉi-jare. Post la solena enmarigo farita laŭ ŝia testamento, la grilo ne vizitis la verandon dum longa tempo. Kaj dume la grilo malfortiĝis pli kaj pli ĝis fine ĝi falis en la angulo de la grundo. Ĝia kadavro baldaŭ putris kaj sur la kovrilon pli da folioj akumulis.

La grilo ne povis imagi kial ŝi preferis funebran ceremonion per la maniero de enmarigo diference de la kutima kremacio. Malgraŭ la dubo, la grilo konsentis al ŝia selekto, ĉar enmariga ceremonio ŝajnis pura kaj simpla. Sur la fundo de la maro kion ŝia animo estas pensanta nun? Ĉu ŝi sentis sin malvarmega en la marfundo sen ia kovrilo? La grilo protektata de varmaj folioj tamen pensis, ke la animo de la edzino ankaŭ havas komfortan loĝejon kune kun diversaj fiŝoj kaj marherboj. Kun tia penso la grilo trankviliĝis.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

- (1) Klaso Esenco por legi “Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia” de Zamenhof (Oni finlegos ĝin en decembro)
- (2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas el libro (de oktobro): “Mondo de travivaĵoj” de Tibor Sekelj; 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado (ĉiu elektas sian originalon por traduko)
- (3) Rudimenta kurso, de oktobro ĝis januaro
- (4) Daŭriga kurso, gvidata de Doi Ĉieko

*Regulaj Klasoj en merkredo:

- (1) Posttagmeza klaso por legi “La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński
- (2) Antaŭtagmeza klaso por legi “Orpantalono”

*Krome neregule, la Klason Belflora kaj alian klason gvidas Doi Ĉieko

Redaktanto parolas

Al niaj rondanoj - Kuraĝu skribi ion kaj kontribuu al ni! Viaj vivaj epizodoj estos interesaj al aliaj.

Al niaj enlandaj legantoj - Ĉu vi ne havas ion diri pri Jokohamo, aŭ pri la kongreso okazonta en tiu ĉi urbo?

Al niaj eksterlandaj legantoj - Via kontribuo estas atendata. Pri via propra lando, urbo, familio, persono mem, aŭ pri Japanio!



S.Z